26a jaro



LA VERDA LUPEO



19 (98) INFORMILO DE ELF-AREK Oktobro 1994

79-A UK SEULO



우 편 엽 서

대한민국 KOREA 80

보내는 사람

Koralo al
la 79-a UK kongresejo


제79차 세계 에스페란토 대회 기념
79-a Universala Kongreso de Esperanto
1994

ESPERANTO

받는 사람

Richard Hirsch
Lambertstr. 12
D-36251 Bad Hersfeld
Germany (德國)









NI PRI NI

ELF-AREK-anoj kunvenis dum la Germana E-Kongreso en Kiel (D).

Dum tiu kongreso, kiu okazis Pentekoste en Kiel, okazis amika renkontiĝo de niaj ELF-AREK-anoj: Hirsch, Heiss, Darbellay, Beau kaj Burmeister. Ni priparolis niajn organizajn aferojn.

En la kongresejo estis videbla E-filatela ekspo-materialo de Rudi Burmeister. Tiu vekis grandan intereson inter la kongresanoj kaj loka gazetaro. La Filatela-Klubo de la urbo Kiel senpage disponigis ekspo-kadrojn kaj invitis la E-filatelan ekspozaĵon al la sekvontjara jubilea pm-ekspo en Kiel. Nia membro Darbellay estis la prezidanto de la LKK. Stampo ne estis por tiu kongreso pro tro altaj kostoj: ĉirkaŭ 1500,-- DM.

Darbellay estas 42-jara inĝeniero. Li eldonis la libron: "Kiu estas kiu en tekniko kaj scienco" (E-istoj). Nun li preparas la duan eldonon. Apud E-pm li kolektas i.a. pm pri strigoj kaj elefantoj. Eble iu el vi povus sendi tiujn al li.

ELF-AREK en la 79-a UK en Seulo (ROK).

Nia Annie Wester partoprenis ĝin kaj sendis de la kongreso eltondaĵon el la kongresa kuriero KVIETA MATENO". Jen ekstrakto:

"...Kunvenis filatelistoj kaj kolektantoj. Por la jara kunveno de ELF-AREK, lunde la 25an de julio, kolektiĝis 30 kolektantoj el 12 landoj. La kunveno, sub gvido la Lech Koseniak (PL), komencis laŭ la tagordo per la ĝeneralaj informoj pri ELF-AREK kaj nia revuo LVL. Post informoj pri novaj E-filatelaĵoj sekvis amika interŝanĝo de esperantaĵoj...".

La kongreson ankaŭ partoprenis: Elda Dörfler (I), Koralo (TJ) kaj Cao Xionglin (TJ). Ankaŭ de ili min atingis la kongresa E-pk kun la E-stampo. Al ĉiuj koran dankon. Ankaŭ mi, Richard Hirsch, dankas pro la alsenditaj E-pk de la UK.

Märtha Andreasson el Gotenburgo (S) donacis al mi 2 diversajn E-bildkartojn (geedziĝa-ceremonio kaj Seula Olimpiado). Eldonis ilin "ESPERO". Certe ekzistas aliaj.

Finfine d-ro Schwarzer el Dresden (D) sendis el la UK la E-pk kun la sciigo, ke la prezidanto de la koreaj esperantistaj filatelistoj estas profesoro por germanistiko en la Goethe-Instituto. Nomon li ne sciigis...

KLUBANOJ SURVOJE

Nia prezidanto Ivar Paulsson dum septembro faris aŭto-vojaĝon al la norda Svedio. Tie la fratino de nia karmemora Kurt Lindström kore gastigis lin kaj transdonis donace multajn stampojn el la postlasaĵo de Kurt Lindström.

Sekvis vizito en la laborista E-klubo de Huskvarna. En la E-semajno de Gotenburgo okazis renkontiĝo kun Märtha Andreasson kaj Andreo Pettyn (Radio Varsovio), ambaŭ simpatiantoj kaj subtenantoj de ELF-AREK. En la urbo Kiel li renkontiĝis kun nia Christian Darbellay. Li montris fotojn el la ELF-AREK kunveno de Habana UK kaj surprizis nin per donaco de E-alumet-skatolo el la tempo de la UK en Kubo. En la fino de la vojaĝo li restadis ĉe nia amiko Werner Heimlich. Tie estis ebleco, trarigardi la grandegan amason de E-filatelaĵoj.

Trista situacio en la membraro de ELF-AREK.

Nia Hirsch sendis cirkuleron al la estraranoj de ELF-AREK pri iom trista evoluo de nia membrostato. Li skribis, ke 23 membroj, kiuj laste pagis kotizon por 1992, ne plu ricevas LVL. 43 membroj ne pagis por 1994, kvankam ili ĉiuj ricevis tri admonojn. Preskaŭ tute ne venis reago!! Ankaŭ ili nun ne plu ricevas LVL. Restas nun 78 membroj el 148. Sekve ne plu eblas presigi LVL, sed nia Hirsch mem fotokopie multobligos kaj dissendos ĝin.

Estas komprenebla afero, ke E-stoj en iuj landoj tute ne kapablas pagi monon eksterlanden. Por ili ni klopodas trovi solvon. Tute ne komprenebla afero estas, ke ĉiuj niaj koreaj membroj ne pagis, kvankam tie en la lastaj jaroj la E-filatela agado estis vigla.

Naciaj E-filatelaj asocioj
****

EPĈ en sia numero 8/94 raportis pri la fondiĝo, kaj, manke de aliaj informoj, jen ekstrakte el la artikolo de YU LE:

"...La 15-an de aprilo 1994 pli ol 60 Esperantistoj kunvenis en Pekino kaj deklaris Ĉ F E A (Ĉina Filatelsita E-Asocio) fondita.

ZOU GUOXIANG, ĝenerala sekretario de ĈEL, prezidis la kunvenon. NI DONGYANG raportis pri la laboro en la nomo de prepara grupo. Direktate de ĈEL li kontaktiĝos kun la Ĉina Filatela Asocio kaj la internacia filatela E-organizo (supozeble ELF-AREK?) pro kunlaboro kaj amikeco.

Prezidanto fariĝis ZHU MINGYI, vicprezidantoj la bone konata NAN YOULI, NI DONGYANG (de EPĈ) kaj LI QIANG.

La kunvenon ankaŭ ĉeestis la ĉefredaktoro de la ĉina gazeto "Filatelo".Dum la kunveno okazis malgranda ekspozicio de E-filatelaĵoj. Okaze de la fondiĝo de PMK de Okcidenta distrikto de Pekino estis emisiita E-an memorkoverto ..."

Fotoj de la kunveno kaj ekspozicio akompanas la interesan artikolon. Montritaj ankaŭ estis foto pri E-pm kaj E-glm de UK-oj.En la kolora foto videblas la nova prezidanto ZHU MINGYI en la mezo kun okulvitroj.Sinceran gratulon al tiu nova E-filatela Asocio, ties fondiĝo montras disvolviĝon de la ĉina filatelo en Esperantujo. Ni deziras sukcesplenan laboron kaj bonan kunlaboron inter ELF-AREK kaj ĈFEA.

Esperanto - filatelaj Ligoj ankaŭ en Ĉeĥio kaj Suda Koreujo

En la Seula kongresa kuriero mi legis:

"...ĉijare fondiĝis Esperanta Filatelista Ligo ĉe la Ĉeĥa Esperanto-Asocio..." Niaj membroj en tiu lando tamen ankoraŭ ne informis pri tiu fondiĝo.

Pri la ebla ekzisto de (Sud-)Korea E-Filatela Ligo mi jam skribis aliloke. Tamen ni absolute ne havas iujn kontaktojn al la koreaj E-filatelistoj, eĉ ni nun devas ĉesi la alsendon de nia LVL manke de kotizpago de ili

EKSPOZICIOJ

Fekete en Budapeŝto

6-an de marto 1994 okazis en Budapeŝto la "TEMAFILA ´94". Nia Fekete partoprenis kun ekspozaĵo de E-aj bildpoŝtkartoj sub la temo: "La

100-jara Esperanto". La ekspozaĵo akiris arĝentan medalon. Koran gratulon al vi!

Ĉin Kajĝi en Pekino

Supozeble dum la fondiĝo de ĈFEA li montris sian ekspozaĵon: "Esperanto kaj Guo Muro - subteninto de Esperanto". Tamen min ne atingis precizaj informoj.

懂得世界语
就懂得世界
冰心

KONI ESPERANTON —
KONI LA MONDON

Bingxin
26 Majo, 1994

Li skribis al mi, ke tre fama ĉina verkistino, s-ino Binxin, (ŝi kunfondis la ĉinan asocion "Amikoj de Esperanto")donis por la filatela ekspozaĵo de Ĉin Kajĝi valoran epigrafon kun jena enhavo: "Koni Esperanton- koni la mondon", Bixin, 26an de majo 1994. Ĉin Kajĝi montris siajn eskpozaĵojn en la 4-a Internacia Esperanto-Konferenco de Sciencistoj kaj Teknikistoj

Gratulon al vi.



LA REDAKTORO; REVENINTE HEJMEN DE SOMERA REZIDEJO, DENOVE PAROLAS:

Sinceran saluton al ĉiuj niaj klubaj geamikoj. Eble ĉi-foje nia informilo aperas iom malfrue dum oktobro. Pri tio mi jam atentigis en nia junia numero. Kaŭzo por tiu: de majo ĝis la 15an de septembro mia somera rezidejo estis tendo apud la urbo Kiel. Sen poŝto, telefono kaj elektro. Mi, do, eldmondiĝis dum tiu tempo kiel en la lastaj jaroj. Sekve ankaŭ ne atingis min viaj leteroj. Nur nun ili kuŝas kiel monto antaŭ mi kaj mi rapidas pretigi la manuskripton por la nuna LVL. Ŝajne okazis, ke parto el la sendaĵoj ne atingis min. Tio certe koncernas leteron de Ĉin Kajĝi el aprilo. Mankas informoj pri la unuaj ĉi-jaraj ĉinaj stampoj kaj tieaj E-filatelaj eventoj. Parte mi trovis informojn pro tiu en iuj numeroj de EPC. Eble sekvontjare mi postliveros tiujn nun mankantajn informojn.

Dankon al ĉiuj, kiuj skribis al mi. Mi pardonpetas, ke ne eblis al mi jam respondi.

Richard Hirsch 70

Nur nun en septembro mi eksciis, ke nia Hirsch dum aŭgusto fariĝis 70-jara. Do, en la nomo de ĉiuj ELF-AREK'anoj mi gratulas al li pro tiu jubileo lige kun ĉiuj bondeziroj. Ni povas esti tre kontentaj, ke vi, Rikardo, estas en niaj vicoj. Vi ebligas al ni solidan laboron por nia E-filatelio. Okaze de via 70-a naskiĝtago akceptu nian sinceran dankon, (se ankaŭ malfrue) pro via laboremo.

Gratulon! Gratulojn! Ĉion bonan por la plua vivo kun via edzino Elizabeto!

STAMPOJ

AŬSTRIO 23 (K 1 + K 2) — 46-a IFEF-Kongreso en Aŭstrio

En la kongresa urbo KREMS la loka filatela klubo organizis okaze de la IFEF-Kongreso filatelan ekspozicion. Funkciis nuliga memorstampo kun mezuro 40x33 mm en speciala poŝta giĉeto de la ekspozicia halo de Krems de la 12.-14.5.1994. La ekspozicio okazis sub la nomo CHREMISIA'95.

En la stampo troviĝas ampleksa teksto en la germana kaj en Esperanto:
KREMS LÄDT ZU CHREMISIA 95 (Krems invitas al CHREMISIA 95)
46-a IFEF Kongreso 1994
esperanto
Modernaj fervojoj
Komuna Eŭropo
Novaj impulsoj

Rang III-Briefmarken-Ausstellung des BSV (Rango III pm-ekspo)
3500 Krems an der Donau (Krems apud la Danubo)

La bildo montras la jubilean E-simbolon, fervojajn relojn kaj signalilon en pozicio "libera vojo".

Ekzistas stampkliŝoj 1 kaj 2. Bildon vi trovas en LVL 18(97) sur paĝo 9.

AŬSTRIO 24 (K 1 + K 2) — 46-a IFEF-Kongreso en Aŭstrio

En la 15-a kaj 17-a de majo funkciis dua E-stampilo aliloke en la halo "Aŭstrio" de la ekspo-centro Krems okaze de la dua pm-varb-ekspozicio de la aŭstraj fervojo-filatelistoj. Tiu stampo havas mezuron de 50x32 mm kaj ekzistas kun kliŝoj 1 kaj 2.

Ankaŭ tiu stampo estas dulingva: en la germana kaj en Esperanto:
dekstra kaj maldekstra flankoj:
BRIEFMARKENWERBESCHAU DER / ÖST.EISENBAHNERPHILATELISTEN
(pm-varb-ekspozicio de la aŭstraj fervojistaj Filatelistoj)

46-a IFEF Esperanto-Kongreso 13.-20. majo 1994

-dato- Krems an der Donau

La bildo prezentas mapon de Aŭstrio kun la rivero Danubo kaj pozicion de la urbo Krems. Videblas la emblemo de IFEF-FISAIC kaj dizela lokomotivo Rh. 5047.

Koran dankon al nia Anton Straif, kiu sendis informan materialon al la redaktoro. Bildon de tiu ĉi stampo vi ankaŭ trovas en LVL 18(97) paĝo 9.

ĈINUJO - STAMPOJ EL 1993 kaj 1994

TJ 1993-45 Datreveno de Mao - Lanzhou

bildo mankas


Lanzhou, 1993 novembro 16 kaj decembro 25
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:
LA 100-JARA NASKIĜ-DATREVENO DE MAO ZEDONG

Bildo: Mao-portreto

Uzita de ? Lanzhou. Desegnis: Guo Jingquan

Tiun stampon mi trovis en nia stampo-banko okaze de vizito ĉe nia Werner Heimlich

| TJ 1993 - 46 Lakaĵo - Haikou |



Haikou, 1993 oktobro 20. Teksto en la ĉina kaj en Esperanto:
LA ANTIKVA ĈINA LAKAĴO, Bildo: Peco de lakaĵo.
Uzita de PMK Haikou (supozeble?)
Desegnis: Zhang Linrui.
Ankaŭ tiun stampon mi trovis meze de septembro 1994 en nia stampobanko.

| TJ 1994 - 05 Demokratoj - Haikou |



Haikou, 1994 februaro 25. Teksto en la ĉina kaj Esperanto: LA PATRIOTAJ DEMOKRATOJ
Bildo: Konturo de Ĉinio kun du manoj.
Desegnis: Zhang Linrui

Ankaŭ trovita en nia stampobanko meze de septembro 1994.

| TJ 1994 - 06 Acipenseroj - Haikou |



Haikou, 1994 marto 18

Teksto en la ĉina kaj Esperanto:

LA RARA ANIMALO ACIPENSERO

Bildo: fiŝo el la familio de la acipenseroj

Desegnis: Zhang Linrui

Ankaŭ trovita en nia stampobanko meze de septembro 1994.

| TJ 1994 - 10 Dezertoj - Haikou |

Haikou, 1994 aprilo 21. Tekstoj en la ĉina kaj Esperanto:
? VERDIGI DEZERTOJN? (bildo ne haveblas). Desegnis: Zhang Linrui
Informo trovita en EPĈ 9/94 paĝo 16.

| TJ 1994 - 07 Ĉina Filatela E-Asocio - Beijing - Peking |

Informo trovita en EPĈ 9/94 kun bildo de memoriga koverto. La stampo sur ĝi ne estas menciita kaj estas neklare, ĉu la memor-koverto estas koverto-tutaĵo kaj ĉu poŝte eldonita?

Ni esperas, ke ni ankoraŭ ricevos informojn el Cinio.
Dato de la stampo: 1994 aprilo 15.

| TJ 1994 - 13 Esperanto en scienco kaj tekniko - Beijing |



Beijing-Xiqu, 1994 junio 15
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:

LA 10-A FONDIĜ-DATREVENO DE SCIENCISTA-TEKNIKISTA ESPERANTO-ASOCIO EN ĈINA AKADEMIO DE SCIENCOJ

Per Esperanto por Scienco kaj Tekniko

Bildo: Emblemo de Esp-SkT (kolombo, terglobo kaj stelo)
Detalojn pri tiu ĉi E-Asocio bonvolu legi en la julia-n-ro de EPĈ 1994 el la plumo de Shen Zhengru.
Informoj kaj stampo senditaj de nia Ĉin Kajĝi.
Dankon! Desegnis: Wen Jingen kaj Ke Shixie.

| TJ 1994 - 15 Verkisto Aiwu - Beijing |



Beijing-Xiqu, 1994 junio 20.
Teksto en ĉina kaj en Esperanto:

LA 90-A NASKIĜ-DATREVENO DE AIWU

Bildo: Portreto de Aiwu, 9 floroj, libroj kaj peniko.
Desegnis: Xie Shaoxing kaj Tan Ailing.
Uzita de PMK Pekino-Xiqu

Aiwu (1904.06.20 - 1992.12.05)estis fama ĉina verkisto kaj sub-tenanto de Esperanto. Li estis tre bona amiko de Bakin.

| TJ 1994 - 19 Esperanto - Konferenco - Beijing |



Beijing-Xiqu, 1994 julio 10 -17

Teksto en ĉina kaj Esperanto:

LA 4-A INTERNACIA ESPERANTO - KONFERENCO DE SCIENCISTOJ KAJ TEKNIKISTOJ

(Pordego de la oficejo STEA en CAS
Ĉina Akademio Societo)

Bildo: Pordego de STEA oficejo
Desegnis: Tan Ailing kaj Xie Shaoxing

Informoj kaj stampo de Ĉin Kajĝa. Dankon al vi.

Bv. korektu en LVL 18(97):
paĝo 8: legu: Demando de Gao (ne: al GAO)
paĝo 6. legu: dekdu-ciklo (ne: dudek-ciklo) en "Jaro de Hundo".

TJ 1994 - 20 E-konferenco - Beijing



Beijing-Xiqu, 1994 julio 10-17.

Teksto en ĉina kaj Esperanto:

LA 4-A INTERNACIA ESPERANTO KONFERENCO
DE SCIENCISTOJ KAJ TEKNIKISTOJ
Bildo: E-stelo inter laŭrobranĉoj.
Desegnis: Xie Shaoxing kaj Tan Ailing.
TJ 1994-10, 11 kaj 12 uzitaj en PMK Xiqu

Informoj kaj stampo ricevitaj de nia Ĉin Kajĝi. Koran dankon al vi! Bedaŭrinde ne atingis min via letero de 23a de aprilo. Supozeble en ĝi estis valoraj sciigoj. Fakte okazis unuafoje dum nia longtempa korespondado perdo de letero.
Pri la E-filatelaĵo memore al nia altestimata s-ano Chu Tunan mi informos post ricevo en la decembra numero de LVL.

NOVAJ FRANCAJ STAMPOJ

F 62 ms-stampo el Chambery

Raymond Boré, 481, Square Esperanto (Zamenhof-Placo) en F-73000 Chambery bonvolis sendi al mi E-bildkarton kun poŝta E-stampo. Temas pri maŝinvarbstampo. La nuliga stampo kun la dato: 1-7-1994 (unua tago) havas la urbnomon: 73 Chambery Centre de Tri-Savoie. La varbkliŝo tekstas:

Maldekstre/horizontale: Esperanto
dekstre: MI ESTAS DULINGVA je suis bilingue KAJ VI? et vous?
sub ĝi la indiko: Chambery CTA 1-7-1994.

Sur la karto ankaŭ troviĝas Esperanta aerpoŝta glumarko.

Sur la loko de la pm estas presita enkadrigita franclingva teksto: Kreinto de Esperanto Zamenhof 1859-1917.

ESPERANTO
MI ESTAS DULINGVA
je suis bilingue
KAJ VI?
et vous?
CHAMBERY CTA 1-7-94

★ ZAMENHOF ★
CREATEUR DE L'ESPERANTO
★ 1859 1917 ★

By air mail
Aerpoŝte
Par avion


Amikajn salutojn

al Rudolf BURMEISTER
Max-Müller-Str. 62
D-09123 CHEMNITZ
Allemagne

Raymond BORÉ
481, Square Zamenhof
F-73000 CHAMBÉRY
Francio

Ankaŭ nia Amouroux sendis al mi tiun stampon kun informoj pri variaĵoj:


a) ekzistas kun datstampo: SPECIMEN kaj noto SECAP=tipo de la stampmaŝino. Ĉar temas pri "specimeno" la stampo ne ricevos specialan katalogon numeron.Ĝi nur aperas kiel rimarko sub F 62.





CHAMBERY.CTA 13-6-94

b) ekzistas kun "PP" (afranko pagita) en la datstampo kaj kun renversita datstampo kun "PP". Ili ricevos la katalog-numeron: TP 14-1 kaj 14-2



CHAMBERY CTA 1-7-94





CHAMBERY CTA 1-7-94



Koran dankon pro la senditaj informoj al niaj Bore kaj Amouroux.

TP-A 3 Paris 83

Nia Amouroux sendis kopion pri filatelaĵo kun la E-stampo de Paris de 1966 "EXPOSITION "Connaissance de ESPERANTO" (Nacia Pedagogia Instituto). La datstampo ankaŭ havas la indikon: "PP".

Rimarko de Hirsch: Ĉar mi ne volas ŝanĝi la katalognumerojn de la TP-stampoj, tiu stampo ricevos la numeron: TP A 3.





NOVAJ HUNGARAJ STAMPOJ

H 128 Tata - 30-a Fervojista E-Renkontiĝo

Ĝi okazis en la urbo Tata 1-3 julio 1994. Ovala poŝta stampo el Tata 1 kun la dato: 1994 jul. 2 havas tekston en la hungara kaj en Esperanto:

Landa Fervojista Esperanto-Renkontiĝo
Orszagos Vasutas Eszperanto Talalkozo 1-3 jul. 1994

La bildo en ĝi montras la Horloĝ-turon el la XVIIa jarcento.

La stampon iniciatis nia Stefan FEKETE, kiu ankaŭ informis pri ĝi. Koran dankon al vi.



La bildkarto de tiu aranĝo kun la horloĝturo, farita de Vilmos Radnai.

H 129 Szazhalombatta - Eŭropa Esperanto-Festivalo

En la urbo SZAZHALOMBATTA okazis 9-15 julio 1994 tiu E-festivalo. Nia Stefan FEKETE sendis la de li iniciatan E-stampon.

La stampo havas la daton: 1994.07.10 (deka de julio).

La teksto:

EŬROPA ESPERANTO-FESTIVALO en la mezo de la stampo kontura mapo de Eŭropo kun E-stelo.




Maldekstre la enpresita emblemo de la kongreso. Ekzistas ankaŭ dekora koverto kun la emblemo. Krome ekzistas sambilda glumarko, supozeble farita de nia Vilmo Radnai. Koran dankon pro la senditaj materialoj al Stefan FEKETE.

I 53 Triest - Alp-Adria-E-Konferenco

Kvankam ni jam informis pri ĝi , tamen ripete, ĉar Elda Dörfler sendis nun detalajn informojn:

Nia Elda Dörfler informis:

"...Okaze de la 6-a Alp-Adria-Esperanto-Konferenco kaj laŭ iniciato de la Triesta Esperanto-Asocio, dimanĉon la 24-an de aprilo 1994 funkciis en la konferencejo, stacidomo CAMPO MARZIO, de 8-a ĝis la 14-a horo poŝta giĉeto por nuligo de ĉiuj elsendotaj korespondaĵoj. Laŭformate kvadrate kun grandeco de 31x31 mm la stampo surhavis itallingvan enskribon: TRIESTE C P 24-4-1994



6A CONFERENZA ESPERANTISTA: Centre la logotipo de la okazaĵo: ALP ADRIO. La stampon kaj la logon projektis kaj desegnis Triesta grafikisto kaj komputoristo ERALDO SEPULCRI.

Multnombraj ne-Esperantistaj filatelistoj ariĝis antaŭ la skribtablo de la du poŝtoficistoj por akiri la unuan poŝtstampon pri Esperanto, aperinta en Triesto.

TEA ankaŭ presis glumarkojn kun la "Alp-Adria" logotipo, kie la majuskla "A" simbolas la Alpojn kaj Adrio (Adriatika Maro).

Estas je dispono filatelaĵoj kun la kolora logo, nuligitaj per la speciala stampo kaj bildkartoj pri Triesto kaj pri la konferencejo kun la stampo..."


Nia Elda Dörfler estis membro de LKK. Estis ŝi, kiu iniciatis la stampon. Tiu fariĝis grava propagandilo inter la ne-Esperantista publiko. Ankaŭ ni gratulas al ŝi pro tia iniciato.

Koran dankon al ŝi pro la senditaj informoj kaj bildkartoj kun la stampo.

Supre vi vidas la asocian koverton kun la logo kaj kun la surpreso: "La Eta Gazeto", monata kluba gazeto. Tiu gazeto enhavas E-filatelan rubrikon, prizorgata de nia Elda Dörfler.

I 54 Vicenza - 64-a Itala Kongreso de Esp.

D-ro Werner Bormann sendis al mi E-bildkarton kun salutoj el tiu kongreso. La stampo havas la daton:
27.8.1994
el la urbo VICENZA.
La teksto en la itala: CONGRESSO ITALIANO DI ESPERANTO. La bildo montras "La Rua", ligna turo, simbolo de la urbo, ŝultre portata dum religiaĵ kaj civilaj festo.
Dankon al d-ro Bormann pro la interesa filatelaĵo.



KORESPONDANTE FREMDLANDEN ONI PREFERAS ESPERANTON !!

Oni korespondas en Esperanto

ROK 4 Seoul - 79-a UK

La stampon mi ricevis kun jenaj datoj: 23-24-25-26-28-29-julio.
En la teksto ni nur supre povas legi "79", la alia estas en korea lingvo. Sub la teksto pozas 7 steletoj. La bildo montras dekstran manon kun skrib-plumo kaj E-stelon kun blanka "E". Tiu "E" videblas nur en la stampo de 23-a julio. Restoj oni ankoraŭ povas legi en la stampo de 24-a julio. Poste la "E" malaperis pro troa uzado de la stampilo.
Elstaras ankaŭ la E-pk de Elda DÖRFLER: la stampo havas violan koloron kaj en ĝi mankas la dato (24-a?).
Ofte troviĝas sur la pk granda viola gumstampo kun la bildo de la kongresa glumarko. Supozeble ĝi estas nepoŝta, sed ornama stampo, farita de LKK. Ne venis informo pri ĝi.
(bildo de la stampo vd. sur la titolpaĝo)

TUTAĴOJ

Tutaĵpoŝtkarto por la 79-a UK

Ni povas ĝoji pri nova, tre bele farita, E-tutaĵ-pk. Bedaŭrinde ne venis informo pri la eldonkvanto, mendinto kaj grafikisto. La surpresita E-pm montras la bildon de kongres-glm kun nominalo de 80 cendoj. Apuda bildo montras kolombon sur bunta terglobo kun E-flago en la beko. La teksto estas en la korea lingvo kaj en Esperanto:

79-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO 1994

Koran dankon al ĉiuj geamikoj, kiuj ĝin sendis al la redaktoro.

Denove TUT-PK el Ruslando elkovrita

De tempo al tempo mi ricevas de ne-Esperantistaj poŝtmarkvendistoj sendaĵojn kun E-stampoj, TUT ktp.. Interalie ankaŭ la sube bildita TUT-PK el Ruslando kun kalendaro por 1922. Laŭŝajne ĝi estis eldonita fine de 1921. Kiu eble scias detalojn de tiuj eldonaĵoj de la "Sovjetlanda Esperantista Uniĝo (S.E.U.)?

Richard Hirsch

ПОЧТОВАЯ КАРТОЧКА

Esperanto!

Proletarioj de c'iuj landoj, unuig'u! Sovjetlanda Esperantista Unuig'o (S. E. U.).

KALENDARO POR 1922.

TAGOJ.	Januaro.	Februaro.	Marto.	Aprilo.	Majo.	Junio.
Dimanc'o.	1 8 15 22 29	5 12 19 26	5 12 19 26	2 9 16 23 30	7 14 21 28	4 11 18 25
Lundo.	2 9 16 23 30	6 13 20 27	6 13 20 27	3 10 17 24	1 8 15 22 29	5 12 19 26
Mardo.	3 10 17 24 31	7 14 21 28	7 14 21 28	4 11 18 25	2 9 16 23 30	6 13 20 27
Merkredo.	4 11 18 25	1 8 15 22	1 8 15 22 29	5 12 19 26	3 10 17 24 31	7 14 21 28
J'au'do	5 12 19 26	2 9 16 23	2 9 16 23 30	6 13 20 27	4 11 18 25	1 8 15 22 29
Vendredo.	6 13 20 27	3 10 17 24	3 10 17 24 31	7 14 21 28	5 12 19 26	2 9 16 23 30
Sabato.	7 14 21 28	4 11 18 25	4 11 18 25	1 8 15 22 29	6 13 20 27	3 10 17 24

TAGOJ.	Julio.	Augusto.	Septembro.	Oktebro.	Noyambro.	Decembre.
Dimanc'o.	2 9 16 23 30	6 13 20 27	3 10 17 24	1 8 15 22 29	5 12 19 26	3 10 17 24 31
Lundo.	3 10 17 24 31	7 14 21 28	4 11 18 25	2 9 16 23 30	6 13 20 27	4 11 18 25
Mardo.	4 11 18 25	1 8 15 22 29	5 12 19 26	3 10 17 24 31	7 14 21 28	5 12 19 26
Merkredo.	5 12 19 26	2 9 16 23 30	6 13 20 27	4 11 18 25	1 8 15 22 29	6 13 20 27
J'au'do	6 13 20 27	3 10 17 24 31	7 14 21 28	5 12 19 26	2 9 16 23 30	7 14 21 28
Vendredo.	7 14 21 28	4 11 18 25	1 8 15 22 29	6 13 20 27	3 10 17 24	1 8 15 22 29
Sabato.	1 8 15 22 29	5 12 19 26	2 9 16 23 30	7 14 21 28	4 11 18 25	2 9 16 23 30

Januaro.
22. ememoro pri pafmortigo de laboristoj en Petrogrado.

Marto.
12. Fino de carismo. 18. Tago de Pariza komunumo.

Aprilo.
14. Morto de Zamenhof (1917)

Majo.
1. Internacia festo de laboristoj.

Junio.
2. Jubileo de Esperanto (1887-1922).

Novembro.
7. Tago de Prolet. revolucio.

Eldono de Kooperativo de S. E. U. Kronstadt. 1921.

La dike presitaj ciferoj montras festotagojn.

GLUMARKOJ

<u>Glumarkoj nur nun trovitaj en la poŝtlasaĵo de Kurt Lindström.</u>

Jubilea glm "Esperanto 100" de la Korea Respubliko, 1987, ve kaj ni sur blanka, ovala

72-a UK Varsovio, 1987, jubilea emblemo kun monumento , ve, flava kaj blua sur blanka, mg, kvadrata 83x83.

Landa Esperantista Renkonto Miskolĉ, 18-21.08.1988
Bildo: Ponto simile al ĉina ideogramo kun ve stelo, kvadrata: 62x62, ni, ve kaj flava sur ora.
(bildigo de la enskribo ne eblis)





<u>Novaj glumarkoj el Hungario</u>

30-a Landa Fervojista Esperanto Renkonto en Tata, 01-03.07.1994. 54x45. Pliaj detaloj nekonataj

EŬROPA ESPERANTO FESTIVALO, HUNGARIO, SZAZHALOMBATTA 1994 07 9-15, oranĝa kaj ve sur blanka, ronda Ø 50 mm, mg





Varbglumarkoj el la 20-aj jaroj:












Tiun bulgaran glm-blokon mi nur nun trovis. Richard Hirsch



<u>BULGARIO</u> 1910 (?) glumark-blokoj

Kongreso sub la temo:

NEOSLAVISMO KAJ ESPERANTO

Folio: 204x170, 1 bloko, dentita
4 blokoj 100x83

supraj blokoj malhelverdaj
subaj blokoj brunaj

La informo, pri kiu temas, venis de Bulgario.

Esperantaj - Telefonkartoj

En Svedio kongresanoj de la SAT-kongreso en Stražnice rakontis al mi, ke oni vendis, ege multekostajn, E-ajn-TK kun surpresaĵo pri la SAT-kongreso. Ili plendis, ke temis pri fuŝproduktaĵo, ĉar anstataŭ elteni 10 aŭ 20 "unuojn", ili ĉesis funkcii post duonminuto. Nia membro Cristian Darbellay posedas ĝin, sed lasis ĝin en la origina stato.

Ie en la E-gazetaro oni propagandis ĝin kiel "la unua E-TK", tamen ni jam en nia LVL 6(85), paĝo 14, informis pri la unua TK el Belgio, ankoraŭ aĉetebla ĉe UEA kaj Flandra E-Ligo.

Ankaŭ ekzistas japana TK kun E-teksto. Detalaj informoj momente ne konataj.

AFRANKSTAMPOJ



Koran dankon pro senditaj salutkartoj kun la Lanti-afrankstampo de Stražnice al: F. Bobigney, Sobiech kaj Darbellay. Bedaŭrinde niaj ELF-AREK`anoj en tiu kongreso ne havis okazon por rendevuo. Ankaŭ la anoncita "Internacia E-Filatela Ekspozicio" ne povis okazi laŭ informo de Hasala dum majo. Krom la afrankstampo ili ankaŭ uzis specialan reko-markon.

Doporučené

67-a SAT kongreso
Strážnice 16.-23.07.94
poštkesto 36
CZ-696 62 STRÁŽNICE

E. LANTI
67-a SAT KONGRESO
Strážnice
16.-23. 7.
1994

696 62 STRÁŽNICE 29. 7.94

ČESKÁ REPUBLIKA
08.00

R 67-a SAT kongreso 16. - 23. 07. 1994 STRÁŽNICE 04337

67-a SAT kongreso
PRAHA
BRNO
16-23.7.94
STRÁŽNICE

Slavomil Strnad
Jižní 466/20
513 01 Semily

Rimarko de Hirsch:

La diversajn ŝanĝojn ĉe la afrankstampoj mi publikigos per la katalog-suplemento 1995. Estas kelkaj ŝanĝoj, ĉefe ĉe la stampoj de Praha kaj de Stražnice. Krome aperis kelkaj novaj kliŝoj.

Bedaŭrinde lastatempe la informoj pri ŝanĝoj kaj novaj AF estas iom raraj. Bv. estonte sendu ĝustatempe tiujn informojn al mi. Dankon!

ANONCOJ

Michel LEGRIS, F-65330 GALAN proponas por vendi:

STAMPOJN, TUTAJOJN KAJ GLUMARKOJN

Bv. kontaktu lin.

STAMPOBANKO

La administranto de nia stampobanko, Werner Heimlich, raportas, ke ĝi momente iomete dormas.

Krome li atentigas, ke ankoraŭ validas la ofertlistoj 1/1990 kaj tiu de komisiona materialo 1/1991, sed kun rabato de 20%.

Tiu eblas pro altigo de Internacia Respond-Kupono de DM 1,40 al DM 2,-- (reŝanĝvaloro).

Do, kaptu la eblecon kaj forigu truojn en via(j) kolekto(j).

KORESPONDA KARTO

XXIII UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO
en KRAKÓW, 1.—8. VIII. 1931

SINO PAULA PITSCHMAN
del. de U. E. A.

WAIDHOFEN a/d. Th.
N. Ö.
Austrio.

E-bildpoŝtkarto kun kongresa stampo de la 23a UK en Krakow (PL) 1931

Informilo de ELF-AREK
Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
Offizielles Organ der ArGe Esperanto (laborgrupo Esperanto) im (en la) BdPh (Germana Filatelista Asocio)
<><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><>
Redakcio ĉe: Rudolf Burmeister, Max-Müller-Str.62, D-09123 Chemnitz
Prezidanto: Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29, S-17144 Solna
Kasisto: Rolf Beau, Jacobstr. 9, D-04105 Leipzig
Banko: Sparkasse Leipzig, Konto-No: 309 022 320
Bankkodnr(BLZ): 860 555 92
Kotizo **1994** *DM 26,-- /13 IRK*
Stampobanko: Werner Heimlich, Fröbelstr. 4, D-29614 Soltau
Kompostis+ ekspedis: Richard Hirsch, Lambertstr. 12, D-36251 Bad Hersfeld